

& Lidja balado:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:31> (

/(MiLa dodo LaLa SoTi; rere rere mido; (#Rekantaĵe: LaLa LaLa LaSo Mi;))×2

(#Rekantaĵe: TiSi TiTi rere mifa mi doLa MiSo La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Pri heroa brava homo ; temas mia kanto.

(×:; **Fajro flamas en la forn'** ;)

Lidja Zamenhofa nomo ; gloras esperanton.

(×:; **Preme pikas drata dorn'**. ; **Ke la tagoj de l' homaro estu pli lu2maj.**)

'2 Naskis ŝin patrino Klara ; jen judino geta kies edzo lingvon fara ; estis tute preta.

'3 Ŝia patro pacon amis ; kaj li lingvon kreis. Sed militoj poste flamis ; fine ŝi pereis.

'4 Por ŝi juna estis ĉio ; esperanto-ligo. La baha religio ; volas unuigon.

'5 Ŝi ĉe patra sia ĉerko ; pensojn piajn plukis. De Baha'-Ul-Lah' la verkojn ; bele ŝi tradukis.

'6 Ŝi laboris por la paco ; malgraŭ la defioj En Eŭropo la minaco ; kreskis de nazioj

'7 En Usono ŝi instruis ; lingvon kaj la kredon. Militemo monda bruas ; ĉase sian predon.

'8 El Usono iri devis ; hejmen ŝi revenis. En Eŭropo paco krevis ; Hitler landojn prenis.

'9 Malfacile tradukebla ; verko Iridiono brulis for kun hejmaj mebloj ; pro naziordono.

'10 Ŝi pereis en Treblinka ; murdis la faŝistoj. Igas penso jen konvinka ; min esperantisto.)